

# PENSEO

*N-ro 243*

*jan. / 2012*

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 23-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Josip Pleadin (Kroatio)



### DECEMBRA TAGO

Frido ruĝe floras sur vangoj cinike.  
En katen' glacia sklavas voj' decembra.  
Vintra tago grincas pasante helike.  
Ĉe rando de valo: arbarego tembra.

Patosa scenaro en vilaĝ' montara.  
Kontaĝa deprimo, neŝatata sent'.  
Bruas laboristoj en lontan' arbara.  
Falas arbotrunkoj en tago sen vent'.

Vilaĝon superas nebula plumono.  
Aŭroro strabe tuŝas la vualon.  
Blanka fumo ŝvebas: ŝpinita kotono!  
Ambosmartelado trakuras la valon.

### DECEMBRO EN FUNEBRO

*Al Vida ĉe la disiĝo*

Decembro kortuŝe ploras,  
decembro en funebro ...  
Sur mortolito kuŝas la artistin'.  
Per ĉerko la vivo ŝin honoras,  
en malgaja tenebro:  
Forpasis filino de la destin'!

La Stelo al propra stelaro iras  
kaj tiras sin lacpiede  
kun digno kaj glorakompan'.

La mondo senspire ŝin admiras  
kaj haltas ĝi senkrede:  
Ekmutas la klakoj de kalkan' ...


Decembro kortuŝe ploras,  
decembro en funebro ...

## Anteo (Ĉinujo)




### realo

hieraŭ mi naĝis el la arkta cirklo  
sur la montopinton ĝolmolangma  
en dek sekundoj.  
dioj kaj budhajoj min premiis  
per knabinoj el silika ĝelo.  
hodiaŭ mi ricevis grupon da geidoj.  
tiuj ĉi estas papilioj,  
kiuj povas piediri sur la lunon  
per unu spiro.  
tie troviĝas arboj sur la maro,  
kies akvo estas acido sulfata.  
la fruktoj diamantaj  
aspektas kiel mamoj de serpentoj,  
kaj la lakto nutras vermojn en la suno.  
rido de planto  
unuĉela ekeksplodas;  
kreiĝas universo en mia hara fino.  
preterfluginte  
la tombon de kabeo,  
gravedaj meteoroj min informas,  
ke jam kapablas iliaj fetoj  
paroli esperante pri militoj  
inter dinosaŭroj kaj miaj geidoj.



## fajro kaj glacio

geiĝo de fajro kaj glacio  
 kreas du senostajn mortojn.  
 la beleco de distanco  
 igas la liniojn paralelajn  
 kruciĝi ĉe la foro nefinia.  
 en miajn sonĝojn vi vin trudas;  
 dum blankaj noktoj mi ludas soliteron.  
 melkantino ridas al mi  
 kaŭrante sur la monto trans rivero.  
 el la mamoj de virbovo  
 ŝprucas larmoj sensalaj.  
 mi masturbas maston jam velmankan  
 imitante tiun belulinon  
 por ke la boato kuru en dezerto.  
 ruĝa pluvego kantas gaje  
 sur la tegmento de najbaro.  
 vento mokas.  
 sableroj kovras mian semon.



## Mori (Usono)



# Se...

1.

Se mi estus birdeto  
 kaj vi, mia ĉielo  
 Mi do povus flugi  
 en via vastega sino  
 Ni estus kune, tagnoke  
 ĝis mi perdus la vivon  
 En via ĉirkaŭbrako  
 atinginte al la fino.

2.

Se mi estus  
 kun mia amatino,

ĉe Kandel-lum'  
 kaj botelo da vino  
 kaj Dio invitus min al Paradiz'!  
 la inviton mi rifuzus dirante :  
 "jen mia paradizo,  
 ĝis la fino!"

3.

Se vi jam  
 forlasis min,  
 se vi jam  
 preterpasis min,  
 se vi ne plu  
 amas min  
 kaj evitas  
 viziti min,  
 kial do, ĉiu meznokte  
 en miaj sonĝoj vi venas  
 por kaŝe re-vidi min?

## Leieladonna (Mekskio)



# En la maro...


Malva bluo  
 kaj mara verdo...  
 blanko ŝaŭma  
 kaj oro olda...  
 vidi la maron estas nostalgiema...  
 estas via memoro, via ĉeesto,  
 kaj la ondoj...  
 ludas kun mi petolaj,  
 kaj insiste trenas sin al mi  
 supraj kaj varmaj...  
 arĝento kaj kristalo...  
 desegnantaj sonĝojn kapricajn  
 kaj nekredeblajn...  
 revenas kaj iras  
 viglaj kaj persistaj  
 senlace...  
 min karesas delikate  
 dum la birdoj serĉas,  
 mi ankaŭ serĉas vin...  
 en mia memoro...

kaj mi scias ke vi estas tie...  
 en tiu verdaĵo vi ludis,  
 multfoje...  
 esti viro kaj infano,  
 tiu estas via mondo,  
 de ondoj kaj sablo,  
 viro de maro,  
 viro por ami...  
 homoj iras kaj revenas...  
 sed ĉiuj pasas, foriras,  
 dum la palmoj  
 balanciĝas...  
 kantantaj iun promeson  
 je atendo...  
 kaj la sablo reflektas vian brilon  
 en la verniso,  
 de la akva tavolo...  
 malva bluo kaj mara verdo...  
 blanko ŝaŭma kaj oro olda,  
 verdo mara,  
 bluo malva  
 kaj oro olda...  
 en kontrasto,  
 kun la ŝaŭmo...  
 alvenas kaj alportas,  
 revenas...  
 ondoj...  
 mi estas sola...  
 ho ve; amo !...  
 kiom da momentoj belaj  
 por kundividi...  
 ili fuĝas...  
 kiel la sablo sube de miaj piedoj,  
 trenata per tiuj...  
 ondoj...  
 konsolaj kaj ŝaŭmaj,  
 amikoj miaj...  
 ili kunportas vian esencon kaj,  
 ĝin rehavigas al mi...  
 kaj mi perceptas vin en ili  
 ir-reiro, ir-reiro...  
 kiel koliero el perloj  
 de diferencaj grandecoj  
 la ondoj...

ĝi ŝajnas donaco de la ĉielo  
 inter verdo mara kaj bluo malva...  
 desegnante konturojn,  
 ili svenas,  
 delikate...  
 malrapide...  
 unu paro klinita fore...  
 paperaj flugludoj el koloraj,  
 flago ruĝa...  
 kaj tiam mi volis verki poemon  
 kun la ondoj...  
 kiuj ludis petole  
 sub miaj piedoj...  
 memoranta tiun amon  
 tiun amon el suno.



## Roseha (Francujo)



## La bazartago

Ĉiudimanĉe okazis  
 Kutima bazaro nia,  
 En malproksima angulo  
 El Maroko.  
 Promenante, ni elektis  
 Aĉetaĵojn.  
 Allogis la rozkolora  
 Karno de akvomelonoj.  
 En vinemaj korboj kuŝis  
 La belaj ruĝaj pimentoj,  
 La spicoj kiuj balzamis,  
 Kaj le mento en bukedoj.

La standoj estis plenplenaj  
 Da pitoreskaj aferoj.  
 Tie pendis kolieroj  
 Koloritaj,  
 Kaj tie-ĉi fulardoj.  
 La babuŝoj, la burnusoj,

La fajne broditaj roboj,  
Altiris la virinajn  
Rigardojn....  
Oni trovis jasmemon !

Iom pli malproksime staris  
Potferaĵoj en argilo  
Kun strangaj arabeskoj...

Plezure, oni gustumis  
La kraketajn benjetojn.  
Apud la olivaj ĵaroj,  
Kuŝis la rondaj panoj  
Ĵus bakitaj !

Finfine, ni promenadis  
Meze de la homamaso  
Kiu plene zumadis.

Dume, la helrufa suno  
Kun siaj flamaj kolharoj,  
Reĝis super le montaro.  
Tra la bluega ĉiel',  
Kelkaj blankaj sudaj birdoj,  
Per majestaj flugiloj,  
Silente ŝvebe glisis.....

### Paŭlo Silas (Beazilo)



## LA KANTO DE LA ARBOJ

Niajn foliarojn ni balancu  
Por elmontri nian varman senton.  
Kaj kun ĝojo en la sunnaskiĝo  
Brilu la espera prakontento.

Birdoj la memorojn nun kunkantu.  
Pasinteco trovu novan vivon.  
Je l' unua lum' de la tagiĝo  
Venu la antaŭo sen modifo.

Plej sovaĝaj bestoj, kies kruroj  
Ne kuris sur la homaraj kampoj,  
Forestadon vian tenu firme

Vivante en sekura *Arbo-lando*.

Dolĉaj riveretoj nin renkontu  
En subteraj fluaj fundaj akvoj.  
Per bongusta manĝo nin provizu.  
Laŭdojn vi ricevos de ni, arboj.

Ventoj susurantaj ĉe la grundo,  
Al nia vian kanton agordu.  
Tuŝu nin per viglaj revivigoj.  
De l' somer' la freŝecon alportu.

Nuboj en ĉielo dum la nokto  
Plenpleniĝu pli kaj pli en l' altoj,  
Nin protektu kontraŭ tiu luno,  
Kontraŭ la ĝenado de la astroj.

En profundo niaj radikoj  
Kruciĝu por malebligi rompon.  
Branĉoj alte sin brakumu:  
Interplektiĝu nia mondo.

### Åke Näsholm (Svedujo)



## Pacomarŝo

Kvankam marŝas ni soldate,  
kore revas ni pri pac' .  
Por informi ĝis konate  
kontinuas ni sen lac' .  
Konatigi nian lingvon  
estas por ni grava cel' ,  
ĉar laboras por la paco  
multaj jam sub verda stel' .

Ni, la pacaj batalantoj  
vokas al la homfratar' ,  
sonu amoplenaj kantoj  
laŭte super ter' kaj mar' .  
Ĉie en la mondo regu  
ĝusta kaj detala pac' ,  
malarmado etendiĝu  
el profundo kaj tra spac' .



## Vinicius de Moraes\*



### Sambo en preludo

Vivo sen vi  
 Ne sencas por mi  
 'Stas vi la motiv'  
 De mia sentiv'  
 Jam nia ĝarden'  
 Ne floras ĉar sen  
 Vi malestas lum'  
 Kaj mankas parfum'  
 .  
 Sen vi jen mi  
 En ĉi sendirekt'  
 Sen varm' de pasi'  
 Ide' sen projekt'  
 Rigard' sen persvard'  
 Ĉi tristokultiv'  
 Sen vi, en mi jam ne pulsas kor', kaj viv'  
 .  
 Ne tardu, venu  
 Vi komprenu ke ankoraŭ brilas vivflamo  
 De nun la amo  
 La inspir' estu sur nia voj'  
 Resopir' donu lokon al ĝoj'  
 .  
 Ne plu ĉi solaj  
 Ĉi senrolaj ni iru, sufiĉu da driv'  
 Ke venu amo  
 Sen vi, en mi jam ne pulsas kor', kaj viv'

*\*Vinicius, i.a. estis lirika poeto brazila, de li multajn poemojn oni muzikigis, kaj kiu fariĝis naciaj furoroj. Ĉi-tiu estas unu el tiaj, do en partnero kun komponisto Baden Powell.*



## John Donne\*



### La pulo

Jen pul', kiom portas ĉi pul'  
 vi negas al mi, povra ul'...  
 Ĝi suĉis min, nun suĉas vin,  
 per sang' unuigante nin.  
 Ne pek', nek hont' estas en ĝi,  
 pucel' ankoraŭ restas vi...

Nu sen pariĝi, sen enu'  
 ŝvelpimpas best' el sang' de du,  
 sed por ni, ve, ne samas ĝu'...

Haltu! Kun pul' ver-vivas tri,  
 kaj en ĝi do fin-edzas ni.  
 Por ni pul' iĝas nupto-lit',  
 kaj sankta ej' de nupta rit'.  
 Nin kunajn preter ĉies vol'  
 tenas gem' gudra ĝis medol'.

Vidu, la rajt' mortigi min  
 de memmortig' akuzos vin,  
 kun tria pek': tri-elimin'...

Ruĝ' el atenc' al senkulpul'  
 'stas do sur via ung' makul'?  
 Ĉu pro nur gutsuĉ' pul' por vi  
 do kulpu sen apelaci'?!  
 Jes! Al vi urĝu konvinkiĝ',  
 ke ni restadas kun prestiĝ'...

Sed lernu kiom falsas tim':  
 De vi por mi honor' sen lim'  
 restos kun pul': senviv-esprim'.

*\*John Donne: 1572 mar 31 1631 estas konsiderata la plej elstara metafizika poeto de sia epoko.*

trakukis



## Ŭel (Brazilo)



# Venas oldulino

Venas oldulino  
kun la mondonaco,  
ŝi ĝin trovas troa  
kaj deprenas parton.

Vinbera branĉeto,  
citrona foli'  
kaj sankta Maria,  
patrino de Di'.

Venas la Tri Magoj  
vice al la stalo  
kun incenso, oro,  
mirho kaj santalo.

Venas la Tri Magoj  
sur sableja pado,  
ili portas fruktojn  
sur grandega plado.

Originala titolo: Ya viene la vieja

Aŭtoro: nekonata

Tradukis



## Svena Dun (Hispanujo)



# Ĉineske

## Vejdo (Ĉinujo)



## Kanto de akvoguto

okaze de Zamenhof-Festo 2011

—laŭ ĉineska skemo Fengrusong\*

jam de sia debuto  
en liliputo  
nia gento traboras  
konstante  
kun voĉ-muto  
la monton granitan  
kiel akvoguto

post multe da disputo  
nova saluto  
el la mondo resonas  
adeptoj per konduto  
konvinka persistas  
ĝis lasta minuto

\*Fengrusong (vento inter pinoj): ĉina fiksfirma  
poemo el du strofoj kun 7 kaj 6 versoj respektive de  
7,5,734,66 / 7,5,77,66 silaboj, laŭ rimarangŝo a,a, xxa,  
xa /a,a,xa,xa (x=senrima)

## Voĉo de paco

okaze de 70-jariĝo de ĈRI\*

—laŭ ĉineska skemo Dekses-Silabo\*\*

Ĉu  
vi ja aŭdas el la blu'  
jen voĉon  
la klaran sen sku'?

Re  
kaj re ĝi kun la ide'  
de paco  
vokas vere tre.

II'

per-radia kun facil'  
elsendas  
ondojn de babil'.

Sen  
interrompo kaj kun pen'  
ĝi viglas  
aktivas sen sven'.

El  
Pekino kun tona bel'  
la voĉo  
plaĉas al orel'.

Per  
radio ĝi kun leĝer'  
disflugas  
trans mont' kaj river'.

De  
la ĉiela apoge'  
resonas  
kant' de jubile'.

Ek  
jam antaŭ jaroj sepdek  
fariĝis  
ĝi l' paca Mekk'

Kor'  
ĝia batadas en ĥor'  
kun la mond'  
por homa honor'.

Jam  
ĝi per multalingva gam'  
brodkastas  
je monda akklam'.

Al  
popoloj en monda skal'  
ligiĝas  
ĝi per son-kanal'.

Ret'  
radia pontas en pret'  
tutmonde  
per sincera kred'.

OI  
milit' la paca parol'  
pli fortas  
ĉe monda popol'.

Jen  
nia od' kun bona ben'  
omaĝe  
al ĝia solen'.

\*ĈRI: Ĉina Radio Internacia

\*\**Dekses-Silabo* (ĉine: Shiliuziling): ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)

\*\*\**La ĉineska poemo estas akrostike verkita. La unua litero de ĉiu strofo ligite formas "ĈRI sepdek jaroj".*



## Stafetado de Nangezi

*Nangezi* (suda kanto): ĉina fiksforma poemo el 4 versoj de 55,7,9 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,a,a (x=senrima)

## Niuniu (Ĉinujo)

### Matenaj rosoj

matenaj rosoj  
premas kun pezo  
herbojn en anestezo  
dorma pro tranokta frenezo

matenaj rosoj  
rebrilas sub sun'  
jam senforta dum aŭtun'  
kaj malgrandiĝas plie jam nun

matenaj rosoj  
 jen efemeraj  
 ĉar taglumo aperas  
 pri beleco ne plu fieras

## Cindy Mckee (Usono)



### Kiam la suno aperos?

Herboj frenezas  
 nokte, sen suno.  
 Ili bruskas en bruno  
 sub simulanta luno.

Homaj herbidoj  
 sen suna brilo  
 frenezas sen stabilo,  
 karnaj filoj de klorofilo.


## Lily (Ĉinio)

### Longa kiso

Lia longa kis'  
 logas min forte  
 amoĝui komforte  
 mi ne forgesas ĝin ĝismorte.

Sento jukema  
 fluas rapide  
 tra korpo sentimide  
 kaj am-fajro brulas senbride.

Volupto vokas  
 al lud' surlita  
 kun karno-spert' ekscita  
 kun lia eniro invita.



## Cindy Mckee (Usono)

### Al seks-maŝino

Mi ŝatas fiki  
 samkiel ĉiu  
 tamen al ŝi mi krii,  
 ne erotomaniu.

Grimpu montaron,  
 televiziu,  
 bonvole pli hobiu.  
 bonegan menson ne mumiu!


## Lily (Ĉinujo)

### Eroto

eroto ŝprucas  
 dum ajna moment'  
 jen kun amora eksent'  
 necesaj' de viva moviment'

ĝi ne lanĉitas  
 per fera maŝin'  
 sed pro amora inklin'  
 al aliseksulo kun obstin'

kial ĝin regi?  
 ĝuu ĝissate  
 buntan vivon laŭŝate  
 domaĝu ĝin iniciate



## Stafetado de Suzhongqing

*Suzhongqing (kora sento): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun 4 kaj 6 versoj respektive de 7,5,65 / 33,3,444 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa / xa,a,xxa (x=senrima)*



## Vejdo (Ĉinujo)

### Acerfolioj ruĝiĝas

ruĝiĝas la tuta val' —  
fajreska koral'  
jen l' acerfolioj  
en ĝoj-festival'

en ventet'  
foli-fal'  
en spiral'  
jen kirliĝas  
jen dancetas  
en flirta bal'

## Cindy Mckee (Usono)

### Vidi, provi aŭtunon

Kiam bruna vegetal'  
iĝas ruĝpetal'  
mi kredas en ŝanĝo  
por ĉi animal'.

Mi provas  
per inhal'  
al vital',  
esperante  
sendi ruĝon  
al mia pal'.

## Vejdo (Ĉinujo)

### Aŭtuna karnaval'

en aŭtuna karnaval'  
ne kolor' de pal'  
regas ruĝa gamo  
tra farb-festival'

de bruno  
en la val'  
ĝis vual'

ruĝa sur mont'  
jen mirplene  
buntas ĝangal'



## Maupassant (1850-1893)



### LA ULĈJO MIAVEŜTO

En la oficejo, la ulĉjo Miaveŝto estis rigardata kiel tipo. Li estis maljuna bonkaraktera oficisto, kiu eliris el Parizo nur unufoje dum sia vivo.

Tiam ni travivis la lastajn tagojn de julio, kaj ĉiu el ni, ĉiudimanĉe, iris sin disruli surherbe, aŭ sin trempi enakve en la ĉirkaŭaj kamparoj. Asnières, Argenteuil, Chatou, Bougival, Maisons, Poissy, ĉiu el tiuj urbetoj havis siajn kutimulojn kaj siajn fanatikulojn. Ĉiu pasie diskutis pri la meritoj kaj la avantaĝoj de ĉiuj tiuj famaj kaj ravaj lokoj por la Parizaj oficistoj.

La ulĉjo Miaveŝto deklaris:

– Aro de Panurgaj ŝafoj! Via kamparo, kiom ĝi beletas! Ni demandis al li:

– Nu, kaj vi, Miaveŝto, ĉu neniam vi promenas?

– Pardonu. Mi promenas per omnibuso. Kiam mi bone tagmanĝis, ne hastante min, ĉe la vinvendisto, kiu estas malsupre de mia apartamentaro, mi kalkulas mian itineron pere de Pariza plano, kaj la indikato de la urbaj linioj kun siaj korespondoj. Kaj poste mi supreniras sur mian imperialon, mi malfermas mian ombrelon, kaj antaŭen. Ho! Kiom aferojn mi vidas, pli multe ol vi, hej! Mi ŝanĝas kvartalojn. Tio estas kvazaŭ mi

vojaĝus tra la mondo, tiom la popolo estas malsimila de iu strato al alia. Mi pli bone konas mian Parizon ol neniun. Kaj nenio estas pli amuza ol la interetaĝoj. Tion, kion oni vidas ĉi-ene, nur per ekrigardo, tio estas neimagebla. Oni divenas geedzajn scenojn, nur ekvidante la kapon de viro kiu krias; oni amuziĝas pasante antaŭ la butikoj de la barbiroj, kiuj delasas la nazon de la sinjoro, tute blankan de sapo por rigardi en la strato. Oni okulumas al la ĉapelistinoj, senkostaj okulumadoj, nur por ŝerci, ĉar oni ne havas tempon por malsupreniri. Ha! kiom aferojn oni vidas!

Tio estas teatraĵo, bona, vera teatro, la naturteatro, spektata laŭtrote de du ĉevaloj. Oho! mi ne interŝanĝus miajn omnibusajn promenadojn kontraŭ viaj stultaj promenadoj en la arbaretoj.

Ni demandis al li:

– Gustumu do, Miaveŝto, iru unufoje al la kamparo, nur por provi .

Li respondis:

– Mi jam iris, unufoje, antaŭ dudek jaroj, kaj neniun retrompos min!

– Tion rakontu al ni, Miaveŝto.

– Tion, kiom vi volas. Jen la afero: ĉu vi konis Trinkvinon, la eks-redaktistan komizon, kiun oni moknomis Trinkakvon?

– Jes, perfekte.

– Li estis mia samoficano. Tiu kajnajlo posedis domon en Colombes, kaj li senĉese invitis min, por ke mi pasigu dimanĉon ĉe li.

Li diris al mi:

– Venu do, Miakuloto (li ŝerce nomis min Miakuloto). Vi vidis la beletan promenadon, kiun ni faros.

Mi, kiel stultulo, lasis min trompi, kaj iun matenon, mi forveturis al Colombes per la trajno je la oka. Mi alvenis en iun specon de urbo, kampara urbeto, kie ni vidas nenion, kaj mi finis trovi ĉe la ekstremo de koridoro, inter du muroj, malnovan pardonon de ligno, havante feran sonorileton.

Mi sonorigis. Mi longe atendis, kaj poste oni malfermis al mi. Kiu malfermis al mi? Tion mi ne sciis ĉe la unua ekrigardo: ĉu estis virino aŭ simiino? Tio estis maljuna, estis malbela, vestita per malnovaj tolaĵoj, tio ŝajnis malpura kaj malica. Tio havis kortobirdajn plumojn en la haroj, kaj ŝajnis voli min vori.

Ŝi demandis:

– Kion vi deziras?

– S-ro Trinkvinon.

– Kion vi volas al li, al S-ro Trinkvinon?

Antaŭ la pridemandado de tiu furiozulino, mi sentis min malkomforte. Mi balbutis:

– Sed... li atendas min.

Ŝi reparolis:

– Ha! vi estas tiu, kiu venas por la tagmanĝo!

Tremante, mi balbutis "jes".

Tiam, turnante sin al la domo, ŝi ekkriis per furiozema voĉo:

– Trinkvinon, jen via viro!

Ŝi estis la edzino de mia amiko. Tuj la ulĉjeto Trinkvinon aperis sur la sojlo de iu speco de domaĉo de gipso, kovrita per zinkaĵo, kaj kiu similis al bruĝujo. Li estis vestita per pantalono de blanka tiko tute makulita, kaj malpura panama ĉapelo.

Post la manpremadaj, li forkondukis min en tiun, kiun li nomis sian ĝardenon, tio estis, ĉe la ekstremo de alia koridoro, kiun formis gigantaj muroj, eta tera kvadrato, granda kvazaŭ poŝtuko, kaj ĉirkaŭita per domoj tiel altaj, ke la suno penetris ĉi-ene, nur du aŭ tri horojn ĉiutage. Penseoj, diantoj, keirantoj, kelkaj rozarbetoj, agoniis funde de tiu putro sen aero, kaj varmigita kiel forno de la reflektadoj de la tegmentoj.

– Mi ne havas arbojn, diris Trinkvinon, sed la muroj de la najbaroj same utilas. Mi havas ombbron kiel en arbaro.

Poste li prenis min per unu butono de mia jako, kal mallaŭte diris al mi:

– Vi tuj faros komplezon al mi. Vi vidis mian edzinon. Ŝi estas dorna, ĉu? Hodiaŭ, ĉar mi invitis vin, ŝi donis al mi purajn vestaĵojn, sed

se mi makulus ilin, mi ne dirus al vi; tiam mi kalkulis je vi por akvumi miajn plantojn.

Mi konsentis pri tio. Mi demetis mian jakon. Mi kuspis la manikojn de mia ĉemizo, kaj mi draŝe ekstreĉis specon de pumpilo, kiu siblis, blovis, raslis kiel ftizulo, por ĉerpi flueton da akvo, simila al la elfluado de fontano Wallace. Dek minutoj estis necesaj, por plenigi unu akvumilon. Mi estis ŝvitoplena. Trinkvinon gvidis min:

– Tie ĉi, – al tiu planto; – ankoraŭ iom. – Sufiĉe; – al tiu alia planto.

La truita akvumilo fluis, kaj miaj piedoj ricevis pli da akvo ol la floroj. La malsupro de mia pantalono, malseka kiel spongo, sorbiĝis per koto. Kaj, dudekfoje seninterrompe, mi rekomencis, mi retrepis miajn piedojn, mi daŭrigis ŝviti plorblekigante la inerciradon de la akvopumpilo. Kaj kiam, lacega, mi volis ĉesi, la ulĉjo Trinkvinon, petegante, tiris al mi la brakon:

– Ankoraŭ unu akvumilo, – nur unu, – kaj tio estos finiĝinta.

Por danki min, li donis al mi rozon, grandan rozon, sed apenaŭ ĝi tuŝis mian butontruon, ke ĝi komplete senfoliĝis, lasante al mi, kiel dekoracio, nur dube verdan malgrandan piron, malmolan kiel ŝtono. Mi miris, sed mi nenion diris.

Tiam ni aŭdis la malproksiman voĉon de S-ino Trinkvinon:

– Fine, ĉu vi tuj venos? Kiam mi diras al vi, ke tio estas pretigita!... Ni iris al la braĝujo.

Se la ĝardeno troviĝis enombre, kompense la hejmo, troviĝis plensune, kaj la dua ĉambro de ŝvitbanejo estas malpli varma ol la manĝoĉambro de mia kamarado.

Tri teleroj, flankitaj de malbone lavitaj forketoj de stano, kuŝis sur tablo de flava ligno. Meze de la tablo, tera vazo enhavis boligitan bovaĵon, revarmigitan kun terpomoj. Ni ekmanĝis.

Granda karafo plena je akvo, iomete kolorita per ruĝo, altiris al mi la atenton. Trinkvinon,

konfuza, diris al sia edzino:

– Diru do, bonulino mia, por la okazo, ĉu vi ne povus doni iom da pura vino?

Ŝi furioze rigardis fikse al li:

– Por ke ambaŭ, vi ebrigu vin, ĉu ne? Kaj vi restadu ĉi tie kriegante dum la tuta tago! Ne, dankon por la programo!

Li silentis. Post la raguo, ŝi alportis alian pladon de terpomoj preparitaj kun lardo. Kiam, silente, tiu manĝaĵo estis finiĝinta, ŝi deklaris:

– Jen la tuto. Nun foriru.

Trinkvinon, konsternata, rigardadis al ŝi.

– Sed la kolombo... la kolombo, kiun vi senplumigis ĉimatene, ĉu?

Ŝi metis siajn manojn sur la koksojn:

– Ĉu vi ne sufiĉas manĝi, eble. Ĉar vi alkondukas ulojn hejmen, tio ne estas motivo por vori ĉion, kio estas en la domo. Kaj ĉivespere, kion mi manĝos?

Ni leviĝis. Kaj Trinkvinon flustris al mi ĉe la orelo:

– Atendu min iomete, kaj ni rapidos.

Poste li iris en la kuirejon, kie lia edzino ĵus eniris. Kaj mi aŭdis:

– Donu al mi dudek soldojn, mia karulino.

– Kion vi volas fari per dudek soldoj?

– Sed neniam ni scias, kio povos okazi. Havi iom da mono, ĉiam estas bona kaj pli singardema.

Ŝi hurlis, por ke mi aŭdu ŝin:

– Ne, mi ne donos monon al vi! Ĉar tiu viro manĝis ĉe vi, la malplej, ke li povus fari, estus ke li pagu viajn elspezojn de la tago.

La ulĉjo Trinkvinon revenis serĉi min. Ĉar mi volis esti ĝentila, mi klinis min antaŭ la dommastrino balbutante:

– Sinjorino... dankojn... gracia akcepto...

Ŝi respondis:

– Estas bone. Sed ne revenigus lin tute ebriga, ĉar vi traktus kun mi, mi antaŭvertas vin!

Ni foriris.

Ni devis, plensune, trapasi ebenaĵon nudan kiel tablo.

Mi volis pluki planton laŭlonge de la vojo, kaj

